و بررسی نقش آن در المپیک های بین المللی

قطعنامه‌ی شماره‌ی ۴۱۸_ ۱۱/۴/۴ یونسکو

بیست و سومین اجلاسیه‌ی عمومی یونسکو:

- توجه عمیق خود را ابراز می دارد که: هشتمین اجلاسیه‌ی عمومی یونسکو، درسال ۱۹۵۴ (۱۳۳۳ ش.) درمونته ویدئو، با قطعنامه‌ی شماره‌ی ۴۲۲۴_ ۴/۱/۴/۴۲۲ خود، نتایج بدست آمده، توسط زبان جهانی اسپرانتو را، تا آن زمان، درعرصه‌ی تبادل اندیشه‌ی خلاق، و برقراری تفاهم میان مردم جهان، ابرام داشته، و نیز تاکید کرده است که آن نتایج حاصله، با اهداف و آرمانهای یونسکو، هماهنگ است.

- اجلاسیه همچنین متذکر می گردد که زبان اسپرانتو درطول این مدت _ ۳۱ سال _ همچنان بعنوان یک وسیله‌ی تفاهم بین‌المللی، درمیان مردمان، و فرهنگ های کشورهای مختلف، باگسترش فزاینده دربیشتراز مناطق جهان، و فعالیت های انسانی، به موفقیت های چشمگیر، نائل آمده است.

- ازاینرو، اجلاسیه برسمیت می شناسد که اسپرانتو، از امکاناتی بزرگ، دربرقراری تفاهم و روابط بین‌المللی، درمیان ملت های گوناگون، برخوردار است.

همچنین، اجلاسیه‌خدمات مهم اسپرانتو، بویژه سازمان جهانی اسپرانتو (ئو.ئه.آ) را، درگسترش اطلاعات، درباره‌ی فعالیت ها، اهداف، و آرمانهای یونسکو، همزمان با شرکت فعال خود درآنها، شایان توجه می داند.

- سرانجام با آگاهی بدین مهم که سال ۱۹۸۷ (۶۶_۱۳۶۵ ش.) برابر باسالگرد نخستین سده‌ی انتشار زبان اسپرانتواست، اجلاسیه، بدین مناسبت:

(۱)_ نخستین فرارسیدن سالگرد این سده‌ی فرهنگی را، به اسپرانتودانان جهان، تبریک می گوید.

(۲) _ از دبیرکل یونسکو خواستار است که بطور مداوم، بادقت، پیشرفت اسپرانتورا، بعنوان وسیله‌ای برای بهبود تفاهم میان ملت ها، و فرهنگ های مختلف، پی گیری کند.

(۳) _ از دولت های عضو یونسکو، دعوت می نماید که بپاس بزرگداشت سالگرد سده‌ی خدمات فرهنگی اسپرانتو، بابرپائی ترتیبات شایسته، همانند انتشار اعلامیه ها، انتشار تمبرهای یاد بود، و مانند آن، ونیز باتشویق، وتوصیه‌ی طرح های پژوهشی، و آموزشی اسپرانتو، گنجانیدن آنها دربرنامه های تحصیلی مدارس، وموسسات عالی آموزشی خویش، بذل توجه ویژه، مبذول دارند.

(۴) _ به سازمانهای بین‌المللی فرهنگی وانسانی آزاد، و غیر دولتی، نیز توصیه می کند که به مراسم بزرگداشت سده‌ی فرهنگی اسپرانتو، به پیوندند. درباره‌ی امکانات بالقوه، و بالفعل اسپرانتو، بعنوان یک وسیله‌ی گسترش تفاهم، با انتشار هرگونه اطلاع ممکن، ونیز درباره‌ی خدمات یونسکو، اقدام جدی بعمل آورند.

(بیست وسومین اجلاسیه‌ی عمومی یونسکو، صوفیه _ بلغارستان)

دنیای ورزش ✱ صفحه ۳۷

تاریخ قطعنامه ۸ نوامبر ۱۹۸۵/ ۱۷ آبان ۱۳۶۴

IRANA ESPERANTISTO

Pajam-e Sabzandiŝan (*Mesaĝo de Verdpensuloj*)

ISSN 1728-6174

IRANA ESPERANTISTO

Kultura kaj sendependa sezon-revuo internacia
N-ro: 12, Dua serio, vintro 2015

***

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuaĵoj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuaĵoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa.

Ĉia presa aŭ elektronika citado aŭ eldonado de materialoj de IRANA ESPERANTISTO, ĉu originale ĉu tradukite en aliajn lingvojn, estas permesata. Bonvole menciu pri la fonto kaj la originala lingvo (t.e. Esperanto aŭ la persa) kaj se eble, informu nin pri eldonaĵo en kiu aperis io de aŭ pri IRANA ESPERANTISTO aŭ/kaj sendu kopion al ni.

Kovrilo:



Grafikaĵo kaj enpaĝigo: Sabzandiŝan

***

TTT-ejo : www.espero.ir
Retpoŝto: info@espero.ir

E-a parto

Optimismo ĉu utilas?



Prelego de Ahmad Reza Mamduhi
En la serio de Monataj Prelegoj de IREA,
28an de Jun. 2014,
En IREA-oficejo, Tehrano

(Fina parto)



Kion vi vidas, pleje dependas de via vid-angulo

Ne gravas al kio vi rigardas, gravas nur tio, ke:

- Kion vi vidas en ĝi!
- Aŭ kiel vi vidas ĝin!
- Niaj mistikuloj en ĉio vidis nur bonon.

Fakte sen optimismemo ni estus iomete depremiaj; ĉar tiuj, kiuj suferas iometan depremion, neniom havas optimismemon pri la futuro; fakte ili estas pli realistaj ol tute sanaj homoj pesimisme. Sed tiuj, kiuj suferas altgradan depremion, havas pesimismemon kaj atendas/antaŭvidas pli malbonan futuron ol la reala.

Rezulto de pesimismo





Eble en la irana literatura kunteksto, ni plej klare povas vidi rezulton de pesimismo en la vivo, verkoj kaj ... sinmortigo de Sadeg Hedajat. (1903-1951, laŭ iuj la plej bona prozisto irana ekpost Sadio (1210-1292), kaj lia ĉefverko La Blinda Strigo (*Bufe Kur*)).

Ĉi tie mi sufiĉigas nur citi titolon de 2010a recenzo/enkonduko de lia ĉefverko La Blinda Strigo (*Bufe Kur*):

"Tiu ĉi Libro Finigos Vian Vivon: La Plej Moderna Persa Romano Verkita Iam Ajn" (This Book Will End Your Life: The Greatest Modern Persian Novel Ever Written) per Porochista Khakpour. El: http://therumpus.net/2010/10/why-i-love-sadegh-hedayats-the-blind-owl/

Kiel sciate, multaj legintoj de la verko sinmortigis. Ankaŭ alia verko de li, "S.G.L.L." klarege montras rezulton de ne esti optimismema pri futuro. Jen citaĵo el ĝi:

"La natura homo, la sana homo, devas bone manĝi, bone trinki kaj bone amori; legado, skribado kaj pensado, ĉiuj estas malfeliĉo kaj kaŭzas abomenaĵon."

3-a kialo por utileco de optimismo

Kiel diriĝis, optimismemo fakte ŝanĝas la subjektivan realon:

Maniero, laŭ kiu ni atendas/antaŭvidas la mondon, ŝanĝas la manieron, laŭ kiu ni vidas ĝin.

Sed, optimismemo ŝanĝas ankaŭ la objektivan realaĵon. Ĝi agas kiel memplenuma profetaĵo.

Kaj tio estas la 3a kialo por montri ke malaltaj atendoj ne gajigos/feliĉigos nin. Kontrolitaj eksperimentoj pruvis, ke:
Optimismo ne nur estas rilata al sukceso, sed ankaŭ ĝi fakte estigas sukceson.

Kieeco de optimosmemo



Optimismemo estigas sukceson en la mondoj de la:

- Lernejoj kaj Universitatoj,
- Sportoj
- Komerco
- Kaj eĉ … politiko.
- Kaj eble, la plej surpriza utilo de optimismo estas … sano:

Se ni atendas la estontecon esti brila, streĉiteco kaj maltrankvilo estas reduktitaj konsiderinde.

Ĉu realo ne nuligas optimismon?



Do, kiel diriĝis divers-fonte, optimismemo havas multajn utilojn. Sed kiel ni povas resti optimismemaj kiam ni renkontas nefavoran realaĵon? Logike, kiam viaj antaŭ-vidadoj/atendaĵoj ne realiĝas, vi devas ŝanĝi ilin, tamen – laŭ la eltrovoj de neŭro-sciencistoj – tio ne okazas!! Jen ilia eksperimento:

Ili petis de invititaj homoj taksi sian probableco de ek-spertado de malsamaj teruraj eventoj en iliaj vivoj. Do, ekzemple, kio estas via probableco de eksuferado de kancero? Kaj poste ili diris al ekzamenatoj la realan probablecon de iu kiel ili por eksuferado de ĉi tiuj malbonokazaĵoj. Por kancero, ekzemple, temas pri 30 procentoj. Kaj poste ili demandis ilin denove, "Kiom probable vi eksuferos kanceron?"




La sciencistoj volis scii ĉu homoj post alpreno de veraj informoj, ŝanĝos sian kredon aŭ ne. Kaj efektive ili faris -- sed plejparte nur kiam la donitaj informoj estis pli bonaj ol kio ili unue atendis. Do ekzemple:

Se iu estis dirinta: "Probableco de mia eksuferado de kancero estas ĉ. 50 procentoj," kaj oni diris al tiu, "Ho, bonan novaĵon. La mezuma probableco estas nur 30 procentoj" la postan fojon, kiam oni demandis tiun, tiu respondis: "Bone, do eble mia probableco estas ĉ. 35 procentoj." Do ili lernis rapide kaj efike.


Sed, se iu estis dirinta:" Probableco de mia eksuferado de kancero estas ĉ. pri 10 procentoj " kaj ni diris, "Ho, malbonan novaĵon. La mezumo probableco estas ĉ. 30 procentoj," la postan fojon, kiam oni demandis tiun, tiu diris: "Jes. Ankoraŭ mi pensas ke temas pri ĉ. 11 procentoj."

Fumado mortigas onin, tamen ne nin sed aliajn! ☺



Fakte sciencaj esploroj montris ke parto de nia cerbo faras nin tiel optimismemaj, kaj ili fakte povis per magnetoj defunkciigi tiun parton provizore. Tamen ĉu fari tion por ĉiam estos utila por ni? Kiel jam dirite, ne; ĉar tia optimismemo havas multajn utilojn por nia sano kaj sukceso.

Ni devas eviti nur troan optimismon, kio en iuj okazoj povas enkonduki al malsukcesoj kaj eĉ katastrofoj.



Flugemaj Pingvenoj

Ĉu vi spektis animacion pri flugemaj pingvenoj? Ĝi titolas Gajaj Piedoj (*Happy Feet*), kaj iel similas al multe pli malnova Johano Lovingston Mevo (*Jonathan Livingston Seagull*) verko far Richard Bach en 1970.

Johano Lovingston Mevo

Bach famegas pro lia amo al flugado ĉu reala ĉu metafora en liaj verkoj. (Richard David bach, 1937-, usona verkisto)

Lia ĉefverko, Johano, enhavis malpli ol 10 mil vortojn, tamen estis plivendita ol ĉiuj aliaj verkoj ekde la tempo de Foririnta kun la Vento (*Gone with the Wind*, far Margaret Mitchell, en 1936.

Bedaŭrege li spertis aer-akcidenton en aŭgusto 2012: surteriĝante en Friday Harbor lia fligmaŝino trafis elektro linion.



Gajaj Piedoj Du (*Happy Feet Two*) estas 2011a aŭstralia-usona 3Da komputil-animacia familia mizik-filmo reĝisorita, produktita kaj kunverkita de George Miller. (1945-, estas renoma aŭstralia filmisto kaj ekskuracisto. Ĝi sekvas alian filmon de Miller en 2006 titolita Gajaj Piedoj (*Happy Feet*).

Dum Johano en la Bach-a plejvendita verko estis enuigita de la ĉiutaga ripetado en la vivo kaj ĉiam kaj ĉiel provis flugi pli kaj pli alten, eĉ se tio ekzeligis lin de la mevaro, la pingvenoj en la Miller-a produkto volas ekflugi renkontinte - laŭ ilia scio - flugantan pingvenon!

Gradoj de optimismo

Povus ekzisti tri malsamaj sintenoj inter la pinvnenoj pri ekglugado de ili:

1.Tiuj, kiuj neniel povis eĉ imagi tion; do ili neniam povus havi ŝancon flugivi – ĉiaokaze!

2.Tiuj, kiuj tro simplanime kaj optimisme ekflugis de altaj lokoj kaj spertis falegon en profundan valon!

3.Tiuj, kiuj optimismis sufiĉe por provi tion, tamen kunhavis ankaŭ paraŝuton, tiel ke en plej malbona okazo, povu ĝui flugadon agle super la valo!

Fontoj:

- http://www.ted.com/talks/tali_sharot_the_optimism_bias/transcript
- http://www.mentalhealthy.co.uk/news/996-optimism-can-be-helpful-to-mental-health.html
- https://www.eheandme.com/news_articles/549652445
- http://salubriousu.com/optimism-and-stress/ **(ties fontoj menciitaj en la posta lumbildo)**
- http://therumpus.net/2010/10/why-i-love-sadegh-hedayats-the-blind-owl/
- http://urbantimes.co/2013/12/it-always-pays-to-be-an-optimist/

Fontoj menciitaj en mia fonto: http://salubriousu.com/optimism-and-stress/

- **Scheier, M. F., & Carver, C. S. (1985). Optimism, coping, and health: Assessment and implications of generalized outcome expectancies. *Health Psychology, 4,* 219-247**
- **Horowitz, M., Adler, N., & Kegeles, S. (1988). A scale for measuring the occurrence of positive states of mind: A preliminary report. *Psychosomatic Medicine, 50,* 477-483.**
- **Scheier, M. F., Weintraub, J. K., & Carver, C. S. (1986). Coping with stress: Divergent strategies of optimists and pessimists. *Journal of Personality ad Social Psychology, 51,* 1257-1264.**
- **Scheier, M. F., Matthews, K. A., Owens, J., Magovern, G. J., Sr., Lefebvre, R. C., Abbott, R. A., & Carver, C. S. (1989). Dispositional optimism and recovery from coronary artery bypass surgery: The beneficial effects on physical and psychological well-being. *Journal of Personality and Social Psychology, 57,* 1024-1040.**
- **Fitzgerald, T. E., Tennen, H., Affleck, G., & Pransky G. S. (1993). The relative importance of dispositional optimism and control appraisals in quality of life after coronary artery bypass surgery. *Journal of Behavioral Medicine, 16,* 25-43.**
- **Mroczek, D. K., Spiro, A., III, Aldwin, C. M., Ozer, D. J., & Bosse, R. (1993). Construct validation of optimism and pessimism in older men: Findings from the normative aging study. *Health Psychology, 12,* 406-409.**

Helpiloj

- http://traduku.net/
- http://www.dik.ir/
- http://www.macmillandictionary.com/
- https://www.google.com/imghp?hl=en&tab=ii
- http://en.wikipedia.org/wiki/Main_Page
- http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:%C4%88efpa%C4%9Do

Vi veturas al montaro. Kion vi vidas de malproksime kaj alproksimiĝante. Kiujn plezurojn vi povas profiti tie?

El miaj notoj: ***Nader Zandi!***

Mi preferas veturi montaron per biciklo, certe moderna kaj speciala montbiciklo. Oni povas halti kiam ajn deziras, sed per trajno aŭ aŭtomobilo tre diferencas. Oni veturas rapide per aŭtomobilo kaj se oni volus veturi malrapide, kompreneble ne povus, ĉar oni kaŭzos malfacilaĵojn por aliaj konduktistoj. Ankaŭ la trajno veturigas rapide la



vojaĝantojn kaj ili ne povas vidi pejzaĝojn bone. Aliflanke, konduki bezonas atenton kaj oni ne povas kaj konduki atente kaj ĝui belajn pejzaĝojn.

Ĉiam, kiam ni alproksimiĝas montaron, ni sentas ŝanĝon de klimato, speciale dum printempo kaj somero. Certe ĉi tiu temo estas diferenca en diversaj landoj kaj kompreneble en diversaj geografiaj regionoj. En kelkaj landoj oni tiel desegnas urbojn kvazaŭ la urboj estas en arbaro kaj parko, kaj do ŝanĝo de klimato ne diferencas kiam oni iras montaron (kiel Germanio kaj Aŭstrio) Sed ĉi tie diferenco estas tre distingebla.

De malproksime vidiĝas kvazaŭ bela pentraĵo. La blua koloro de ĉielo, la verda de arboj, kaj diversaj buntaj floroj kiujn akompanas kantoj de birdoj ĉiuj kune kun kaŭzas ĝojon kaj ŝanĝon de farto. Interese. dumtempe, malfacilaĵoj de la vivo forgesiĝas. Oni ĝojas povi eniri ĉi tiun medion.

La rivero defluas montaron kaj videblas fiŝkaptistoj kiuj iras al ĝi. Ankaŭ alpistoj kun siaj iloj kaj buntaj dorsosakoj iras al tiu direkto. Mi ĉiam ŝatas tendaron de alpistoj, speciale somere. Tie malvarmaj noktoj en la varma somero estas neforgeseblaj.

En ĉiu kvar sezonoj, montaro estas belega , kaj oni povas profiti diversajn plezurojn ĉiusezone. ***

MIA VOJAĜO AL IRANO

Bruno Henry, Francio



Delonge mi pensis vojaĝi al Irano, kaj Istanbulo en Turkio por viziti vindindaĵojn kaj malkovri kulturon kaj popolojn. Mi jam sciis ke aktivas E-movado en Irano kaj eblas vojaĝi trajne de Eŭropo al Irano kaj uzi la «Pasporta Servo»-n. Mi vojaĝis ĉefe per trajno dum sep semajnoj en julio kaj aŭgusto 2012, vizitis Iranon dum tri semajnoj kaj etapis en aliaj landoj dum kelkaj tagoj.

Mozelo kaj Rejno

Frumatene mi forveturas trajne de Thionville kaj post ĉefurbo Luksemburgo mi laŭiras la riveron Moselle kaj la riveregon Rejno kiuj estas tre romantikaj ĉar staras fortikaĵoj kaj kasteloj sur la pinto de montetoj.

Alpoj

Vespere la trajno transiras Alpojn de Aŭstrio ĝis Slovenio grimpante super valoj kaj belaj pejzaĝoj.

Beogrado Serbio


Post 24 horoj da trajnveturado tra Luksemburgio, Germanio, Aŭstrio, Slovenio, Kroatio kaj Serbio, matene mi rendevuas en Beogrado kun Dimitrije kaj lia amiko. Ni babiladas pri eks-Jugoslavio kaj ili tre bedaŭras la dispartigon de la lando, la malkuniĝon kaj la abomenaĵojn de la milito kiu okazis en Jugoslavio.

Beogrado estas agrabla urbo pli trankvila ol Parizo. Kelkajn ŝpurojn de la milito mi vidas kiel la ministrejo de armeo kiun NATO bombadis en la jaro 1999.

Mi gustumas bongustajn Ĉevapiĉi (rulumita kaj rostita viandaĵo kun cepoj kaj kremoj). Mi restadas du tagojn en Beogrado.

Sofio Bulgario

Post unu nokto da veturado, inter du trajnoj mi vizitas Sofion, la ĉefurbon de Bulgario. Mi demandas al maljunulo kie estas la ortodoksa katedralo Aleksandro Nevski. Li respondas bone al mi en la franca lingvo! Surstrate kiam mi



Sofio katedralo A. Nevsky

demandas kie estas la stacidomo kelkaj homoj kapablas respondi al mi en la franca! Multaj bulgaroj lernis la francan en la lernejo oni diras al mi.

Istanbulo Turkio

Post unu nokto en trajno mi atingas Istanbulon kiu estas giganta urbo. Estas la plej grava urbo pri ekonomio kaj kulturo en Turkio, en kiu loĝas 14



Istanbulo Bosforo

milionoj da loĝantoj. Ĝi estis ĉefurbo de tri imperioj kaj nomiĝis antaŭe Bizanco, Konstantinoplo kaj Stambulo. La historio de Istanbulo komenciĝis antaŭ 8000 jaroj! Mi vizitas la bluan moskeon «Sultanamet» kaj la moskeon Sankta Sofia «Ayasofya». La arkitekturo estas impona kaj mirinda! Kolonoj, muroj estas riĉe



ornamitaj per arabeskoj kaj kaĥelaroj el fajenco. Mi tre ŝatas la kvietan etoson de la moskeoj. Ankaŭ oni povas ripozi ĉar la aero estas pli freŝa ol ekstere! Estas pli bone viziti surloke tiujn monumentojn ol rigardi filmojn aŭ fotojn pri ili!

Multaj turistoj el la tuta mondo vizitas tiujn famajn moskeojn kaj la urbon. Mi aŭdas lingvojn el la tuta mondo!

En la granda bazaro de Istanbulo oni vendas ĉion!

Istanbulo ĉirkaŭas la markolon Bosforo (inter Eŭropo kaj Azio, ĝi interligas...) kaj la golfon Ora Korno. Multaj ŝipoj traveturas ilin por transporti milojn da homoj al diversaj flankoj de la urbo.

La antaŭlastan tagon en Istanbulo mi renkontas esperantiston Can, kiu loĝas en la azia parto de la urbo. Li gvidas min en la urbo kaj ni vespermanĝas en lia hejmo kun liaj fratino kaj patrino. Li rakontas al mi ke la E-movado estas malforta en Turkio sed esperantistoj instruas Esperanton.

Ofte mi manĝis en malmultekosta restoracio apud la stacidomo Sirceci. La turka manĝaĵo estas tre bongusta kaj fama.

Trans Azia Ekspres'

Post kvin tagoj en tiu mirinda urbego mia amiko Can gvidas min al la buso al Ankaro ĉefurbo de Turkio. Post unu nokto en buso mi alvenas frumatene en Ankaron. De tie mi veturas per trajno nomita «Trans Azia Ekpres'» al Teherano ĉefurbo de Irano. Entute tiu vojaĝo daŭras 72 horojn por 3000 km, 3 noktoj kaj 2 tagoj!



Ankaro Trans Azia Ekspres'

En la kupeo tre afabla iranano donas al mi rizon, panon kaj kukon. Bedaŭrinde ke mi ne povas interbabili, ĉar li parolas nur en la persa lingvo. Alia iranano gvidas min al kuŝvagono por babili kun francaj junuloj. Ili veturas al la lago Van en Kurdio regiono kiu situas oriente de Turkio. Mi rakontas al ili kio estas Esperanto. Ili miras ke mi vojaĝas al Irano ĉar malmulte da eŭropanoj vizitas ĝin ĉar ili pensas ke Irano estas danĝera islama lando!

La turka trajno veturas malrapide tra la montaro kaj laŭ tumultaj riveroj, valoj kaj kamparo. Vespere ni traveturas dum 4 horoj la belan lagon Van, 100 km-ojn longan per pramŝipo. Ĝi estas blua kaj ĉirkaŭita de montaroj.

Ĉe la transa flanko, nin atendas irana trajno. En la kupeo mi konatiĝas kun du francaj homoj patro kun filino kaj kun slovenoj. Ni interŝanĝas niajn informojn pri Irano kaj mi rakontas al ili pri Esperanto.

Post la landlimo ni ĝustigas nian brakhorloĝon kaj aldonas 2H30. Ankaŭ ni ŝanĝas kalendaron, ĉar ekde nun ni uzas en Irano muzulmanan kalendaron. Ni estas en la jaro 1391 kaj en aliaj landoj ni estas en 2012. La skribaĵo estas araba sed la lingvo estas persa, ĉar irananoj ne estas araboj sed azia popolo.

La irana trajno serpentumas malrapide tra sekaj montaroj kovritaj de kelkaj kreskaĵoj. Kelkaj ŝafaroj paŝtas kun hundo kaj ŝafisto. De tempo al tempo aperas izolitaj domoj aŭ vilaĝoj.

Postagmeze la trajno haltas en stacidometo kaj la konduktoroj elvagoniĝas por preĝi en la moskeo apud stacidometo. Varmegas ĉi tie !

Je la unua matene Hamzeh akceptas min en la stacidomo de Tehrano kaj veturigas min al Giti.

Tehrano Irano

Tehrano ĉefurbo de Irano estas giganta kaj enhavas ĉirkaŭ 12 milionojn da loĝantoj. Konstruataj domegoj kaj turoj multegas. Sed kelkaj kvartaloj aspektas vilaĝoj. Rande de la urbo oni kreskigas legomojn kaj arbofruktojn en ĝardenoj kaj kampoj. Tiu urbo estas konstruita piede de la montaro Alborz kies la plej alta pinto estas 5601 metrojn alta. La trafiko estas tre densa kaj danĝera. Oni ne respektas la «leĝon». Estas leĝo de la plej forta homo. Multegaj motorcikloj pafkrakantas kaj zigzagas inter la veturiloj. Aŭtoj hupadas konstante! Pro densa trafiko poluado kreskas, malbonodoras kaj nubo flugas super la urbo. Pro tio kelkfoje oni ne bone vidas la pinton de la montaro!

Giti gvidas min dum tri tagoj por viziti Tehranon. Ni vojaĝas per metroo kaj busoj. Kelkaj metrovagonoj estas rezervitaj por virinoj. Tamen virinoj povas akompani edzon aŭ konatulon en



Tehrano Giti Familio en Restoracio

aliaj metrovagonoj. En la urba buso la antaŭa parto estas por viroj kaj la malantaŭa parto estas por virinoj. Kelkaj viroj en metroo rimarkas ke mi estas eksterlandano kaj faras demandojn al Giti pri kiu mi estas. Ŝi diras ke mi estas franco kaj ke ni interparolas en Esperanto. Ŝi klarigas al ili kio estas Esperanto. Ni vizitas la reĝan palacon Golestan de eksa Reza Shah PALHAVI. Li estis la eksa irana reĝo kaj en 1979, revolucio forpuŝis lin. Tiu palaco estas ornamita lukse kaj riĉege. Ankaŭ en Tehrano estas granda bazaro kiel en Istanbulo kie mi vidis en butiko grandajn persajn belajn tapiŝojn!

Mi vespermanĝis post la noktiĝo kun familianoj de Giti. Nun dum preskaŭ mia tuta restado okazas ramadano. Do, ĉiuj trinkas kaj manĝas post noktiĝo. La restoracioj ne laboras la tutan tagon. Ni manĝas sidante sur la suroj kaj sur tapiŝoj. Muziko estas aŭdebla. Ni manĝas rizon kun safrano, kokidojn, salatojn kaj diversajn bongustajn dolĉaĵojn. Filo de Giti kun edzino kaj la gebopatroj de filo estas tre afablaj kaj simpatiaj. Ili faras demandojn pri nia vivo en Francio kaj demandas al mi kion opinias francoj pri Irano. Homo dancas, kun giganta kapo de kuiristo surŝultre, sur bela irana muziko. Oni diras al mi ke en Irano oni ne rajtas danci! Tre bedaŭrinde!

Nun mi pasigas tri tagojn ĉe Surush kaj Zohre. Ni iras aŭte al infanĝardeno kie Zohre estas direktorino. Zohre montras al mi la ĉambrojn kie lernas aŭ ludas la infanoj. Tie Zohre instruas la anglan al kvin-jaraĝaj geknaboj. «Ĉiuj gepatroj volas ke iliaj gefiloj lernu la anglan» diras al mi Zohre. Verŝajne tio multe amuzas ilin. Mi estas kuriozaĵo ĉi-tie! Oficisto de la urbodomo venas tien kaj invitas min viziti sian oficejon.

Ni vizitas Nasrin la fratinon de Zohre. Nasrin kaj Zohre estas fratinoj kurddevenaj. Ni tagmanĝas kaj vespermanĝas post la noktiĝo sub laŭbo en nova granda parko. Temperaturo estas pli freŝa ol en la domo. Mi ludas per domenoj kun Sepehr dek-jara filo de Zohre kaj Surush kaj poste kun Ayda dek ok -jara filino de Nasrim kaj Shahram mi ludas per ludiloj de la parko.

Fine de mia restado en Tehrano, Hamzeh kaj lia edzino kaj du filinetoj gastigas min tri tagojn. Hamzeh gvidas min por viziti la turon Azadi. Ĝi estas 48 metrojn alta betona konstruaĵo kun enormaj piedoj kiel la Ejfel-turo en Parizo. Reĝo Mohammd Reza PALHAVI konstruigis ĝin antaŭ 40 jaroj. Ene estas mirinda muzeo pri belaj diverskoloraj ŝtonetoj...ankaŭ roboto ludas pianon!

Kun Hamzeh, lia edzino kaj la filinetoj ni forveturas aŭte norden de Teherano al la parko Jamshidiyeh je unu horo da veturado. La parko etendiĝas ĉe la altaĵoj de la montaro. Verdiĝanta arbaro, rokoj kaj panoramo super la ĉefurbo donas bonajn kialojn por veni tien. Ni trovas ĉi-tie malvarmeton sub la arboj kaj ankaŭ dank'al akvo kiu rapide malsuprenfluas de la montaro tra kanaletoj laŭlonge de la vojoj. Tio bonefikas ĉar en la urbo estas varmego. Hamzeh kaj mi decidas grimpi sur la ŝtuparo kiu kondukas al vidpunkto ĉe la supro de la montaro. De la supro ni miras la panoramon de la giganta Tehrano kiu etendiĝas laŭ 100 kilometroj ĉirkaŭita de montaro. Vento ne multe blovas sur tiu urbego. Pro tio vualo, formita pro poluado, stagnas super Tehrano blokita inter montaro. Pli malmultas la vualo ĉar hodiaŭ estas ripoztago. Ni malsupreniras kaj nombras la ŝtupojn. Estas 550 ŝtupoj entute!

Isfahano Irano

Post unu nokta busveturado de Teherano mi alvenas matene kun Giti je la kvina en urbeton antaŭ Isfahano. Giti petis de la ŝoforo de la buso halti ĉe la rando de la aŭtovojo sub ponto. La edzo de Farshide venas kun sia aŭto por ŝofori nin al sia domo. Pro ni, tiuj homoj ne dormis la tutan nokton por akcepti nin. Ili varme akceptas nin kun ilia juna filino por du tagoj.

Ni vizitas la ĉefan palacon kie staras du belaj moskeoj kovritaj per blua ceramikaĵo. Tutcerte estas unu el la plej belaj en la mondo. Ni ankaŭ vizitas la palacon de la ŝaho. Isfahano estis ĉefurbo de la persa imperio kun granda civilizacio. En la bazaro estas multe da metiistoj, veraj artistoj, kiuj prilaboras el kupro kaj stano (metalo griza kaj facile fandebla) telerojn, kruĉojn, kulerojn, soldatojn, ankaŭ latunaĵojn, (flava alojo el kupro kaj zinko), ledaĵojn (felo preparita por industriaj uzoj: ŝuoj, rimenoj kaj aliaj), kaj kaligrafiaĵojn. Ili laboradas antaŭ ni.

Yazd Irano

De Isfahano ĝis Yadz ni busveturas posttagmeze. Yazd estas fama urbo en Irano pro sia tre bongustaj kukaĵoj kaj sukeraĵoj. Mi frandis ilin!

Sabate ni vizitas la malnovan urbon kun ĝiaj domoj konstruitaj per argilmasonaĵo. Mi vidis ĉe la supro de domoj inĝeniajn ventokaptilojn, iam nomatajn «ventoturoj» «badgir». Estas vertikala strukturo apud domo (privataj aŭ publikaj) por enkonduki venton en la internon de la konstruaĵo por malvarmigi per akvo la venton kaj desekigi la enajn spacojn. Ventokaptilo aspektas kiel tureto kovrita ĉe la supro kaj ĉe la vandoj estas vertikalaj fendetoj por ke eniru la aero.

Ĉi-tie, ni estas ĉe la rando de la dezerto: 35 gradojn kaj pli varmas ol en Tehrano kaj Isfahano.

Elirante de la prizono de Aleksandro, francoj alvokis min. Estas Olivier kaj lia filino Laura kiujn mi renkontis antaŭ unu semajno en la trajno ĉe la landlimo inter Turkio kaj Irano. Ni interŝanĝas pri niaj vojaĝoj kaj tagmanĝas kune en restoracio.

La fino de la unua parto

INTIMA PROPONO

Eliĝu el la domo!

Ofte estas, necese vi el via domo (karaktero, posteno, situacio) eliri kaj bone pensi ĉu ankoraû vi volas reiri al tiu domo (karaktero, posteno, situacio) aû ne?

Estas necese, ofte vi el moskeo, eklezio kaj… eliri kaj vidi kio estas malantaû tiuj kredoj, timo aû vero? Estas necese, ofte vi eliri el via laborejo kaj pensi kiom tio similas al viaj junulet-deziroj?

Estas necese, foje vi akvumi arbon, floron, karesi kaj manĝigi beston, kaj vidi ĉu io el naturo ekzistas en vi aû ne?

Estas necese, foje vi ne estu apud via komputilo, kaj ne pripensi pri "Google, Gmail" kaj similaj, tiam kunveni kun viaj familianoj, aû aûskulti je korelverŝado de via amiko kaj pensi ĉu la vivo nur estas tiu ĉi ferpeco elektra aû ne?

Estas necese vi eliĝi el vi kaj defore rigardi al vi mem kaj demandi, ke pasis jaroj, ĝis mi fariĝis tia, kia nun mi estas, ĉu mi volis mian nunan hodiaûon ? ĉu tio valoris?

Aperis en la gazeto Salamat, Ĥordad 1393.3.3
Enesperantigis: M. Fahmi

KOMENCANTO SKRIBAS

Mi konis du e-istajn geknabojn en la lecionoj de E-kurso somere, kiuj vojaĝis al tuta mondo.

Iliaj aventuroj montris ke mi povas ankaŭ vojaĝi kaj komuniki kun aliaj homoj el aliaj landoj.

Esperantaj amikoj akceptos min tre varme ĉie, ĉar ĉiuj esperantistoj sentas sin el unu familio. Tiu kiu ŝatas scii pri aliaj moroj kaj viziti landojn, devas certe tuj lerni Esperanton, ĉar komuna lingvo estas la ŝlosilo por kompreni kaj komuniki kun ne-konatoj. Se ili ne parolas tiun lernindan lingvon, ili ne povus trovi amikojn en ĉiu lando. Kvankam Esperanto helpis multe homojn senti havi unu komunan mondon, sed tiu ideo ne estos atingota nur per afableco kaj unueco. Kiam homoj rigardas sin kiel fingroj de unu mano, tiam povus fari mondon por vivi trankvile. Ni esperu tiun tagon.

Verkis: M. Tamaddoni

1– Unu el kontinentoj (sen fino)

2– malĝuste fari ion

3– Prefikso signifanta ke oni ĉesis plenumi profesion, oficon, rajti por titolo, ktp

4– Viro kiu laŭlege kunvivas virinon (radiko)

5– Kiam oni multe drinkas


6– Komenco de rido (radiko)

7– Fino en angla lingvo

8-Pli malpli klara ripetiĝo de sono respondata al orelo


9– Verbo kiu esprimas nunan ekziston

10– Araba lando (sen fino)



Cerbumu

IREK II



Post la okazigo de sia unua nacia kongreso de Esperanto en 2014 la irana E-movado nun prepariĝas por la dua kongreso en aŭgusto ĉi-jare. La rezultoj de la unua estis rimarkindaj: la lingva nivelo de la veteranoj evidente pliboniĝis kaj oni starigis novajn kursojn. Inter la rezultoj de la pasintjara IREK (Irana Esperanto- Kongreso) menciindas ankaŭ la restarigo de IREJO kaj IRLEI (la landaj sekcioj de TEJO kaj ILEI respektive).

La E-movado en Irano estas evidente forta kaj aktiva en la okcidenta Azio kaj Mez-Oriento. Iranaj esperantistoj bonvenigas eksterlandajn partoprenantojn kaj proponas senpagan aliĝon al la dua IREK al siaj najbarlandanoj.

Nuntempe, krom regulaj kursoj, okazas en ĉiu monato en Tehrano unu E-renkontiĝo kaj prelegoj. Lastatempe en aliaj grandaj urboj (Esfahano, Ŝirazo kaj Maŝhado) okazis seminarioj por prezenti la lingvon.

Hamzeh Shafiee



Egalrajta diskuto | Azio

La foruma aspekto de Esperantujo: orientaziaj spertoj

Kio estas KAEM?

Azio | Irano

La movado plifortiĝis post la unua E-kongreso





Aperis enlande kaj Esperantuje



Floroj el "La Florejo" de Sadi

Dank' al Dio, La Plej Glora kaj Plej Valora, mi finis tradukadon de la du unuaj ĉapitroj de "La Florejo" de Sadi. Jen du floroj elektitaj por vi el la dua ĉapitro.



D-ro K. Sayadpour

Rakonto 5

Kelkaj piuloj estis en komuna vojaĝo, kun ĉies avantaĝo kaj malavantaĝo. Aliĝi al ili mi proponis sed ili oponis. Mi diris: "Al bona konduto de l' nobluloj ne konformas abomeni mizerulan babilon kaj avari favoron kaj utilon. Ĉar mi kredas ke en mi estas sufiĉe da energio kaj rapideco por akompani vin lerte kaj ne ĉagreni vin inerte.

Se mi ne povas rajde vin eskorti,
Mi povas ĉeval-kovrilon kunporti.

تنی چند از روندگان متفق سیاحت بودند و شریک رنج و راحت. خواستم تا مرافقت کنم موافقت نکردند. این از کرم اخلاق بزرگان بدیع است روی از مصاحبت مسکینان تافتن و فایده و برکت دریغ داشتن که من در نفس خویش این قدرت و سرعت می شناسم که در خدمت مردان یار شاطر باشم نه بار خاطر.

ان لم اکن راکب المواشی   اسعی لکم حامل الغواشی

Unu el ili ekdiris: "Ne malĝoju pro tiu eldiro, ĉar dum pasintaj tagoj ŝtelisto vestita kiel derviŝoj aliĝis al ni.

Oni ne scias pri kaŝit' en kamero,
Skribint' scias kio estas sur letero.

Kaj pro la bonintenceco de derviŝoj, ili ne pensis suspekte kaj akceptis lin respekte.
Dalg [1] estas aspekta derviŝa ekstero,
Kaj sufiĉas! Ena estas la cetero.

Vestiĝu ĉiel ajn kaj faru bon-agon,
Metu sur l' kapo kronon kaj portu flagon.
En kiraso estu viro de milito,
Armil' ne utilas al hermafrodito.

یکی زان میان گفت: ازین سخن که شنیدی دل تنگ مدار که درین روزها دزدی به‌صورت درویشان برآمده، خود را در سلک صحبت ما منتظم کرد.

چه دانند مردم که در خانه کیست ؟ نویسنده داند که در نامه چیست ؟

از آنجا که سلامت حال درویشان، است گمان فضولش نبردند و به یاری قبولش کردند.

صورت حال عـــــارفان دلق است این قدر بس که روی در خلق است

در عمل کوش و هر چه خواهی پوش تاج بر ســــر نـه و علم بر دوش

در قژاکنـــد مــرد بــایــد بـــــود بر مخنث سلاح جنگ چه ســود؟

Tagon ni marŝis ĝis la vespero kaj nokton apud kastelo ni dormis kiam la malbeata ŝtelisto uzis la okazon kaj forprenis ies vazon por ŝajne lavi la vizaĝon sed fakte rabi la aĵon.

Rigardu al tiu Dalg-porta pseŭdoderviŝo,
farinta azen-kovrilon el Kaab-tapiŝo.

Kiam li foriris de la derviŝara vido, li iris en la kastelon kaj ŝtelis juvelon. Kiam la suno ekbrilis, tiu malbrilulo jam foriris enorme kiam la senkulpulaj amikoj ankoraŭ ripozis dorme. Matene oni ĉiujn portis al la kastelo, batis, kaj malliberigis. Tial ni evitas popolon kaj adoptis izolon ĉar "Saneco estas en soleco."

Se el popolo iu agas malbone
Por la suba kaj supra estas domaĝo
Se malsaniĝas bovo en la pastejo
Malsaniĝos ĉiuj bovoj en l vilaĝo"

Mi diris: "Dankon al Dio, La Plejvalora kaj Plejglora, tial ke mi ne seniĝis je derviŝa favoro, kvankam ŝajne mi soliĝis kaj perdis unikan okazon paroli kun ili. La rakonto estas utila ĉar tiaj spertoj ĉiam profit-donas al homoj kiel mi.

Ĝentiluloj kiam ili kunvenas
eĉ unu malĝentilan ne eltenas.
Ja malpurigas enfalinta hundo
parfumplenan basenon dum sekundo(2)."

روزی تا به شب رفته بودیم و شبانگه به پای حصار خفته که دزد بی‌توفیق ابریق رفیق برداشت که به طهارت می‌رود و به غارت می‌رفت.

پارسا بین که خرقه در بر کرد جامه کعبه را جل خر کرد

چندانکه از نظر درویشان غایب شد به برجی رفت و درجی بدزدید. تا روز روشن شد آن تاریک مبلغی راه رفته بود و رفیقان بی گـنـاه خـفـتـه.
بامدادان همه را به قلعه درآوردند و بزدند و به زندان کردند. از آن تاریخ ترک صحبت گفتیم و طریق عزلت گرفتیم و السلامـة فی الوحده.

چو از قومی، یکـــــی بی دانشی کرد نه که را منزلت مانـــد نه مـــه را

شنیدستـــــی که گاوی در علف خوار بیالایـــــد هـــمـه گاوان ده را

گفتم سپاس و منت خدای را عزوجل که از برکت درویشان محروم نماندم گرچه بصورت از صحبت وحید افتادم. بدین حکایت که گفتی مستفید گشتم و امثال مرا همه عمر این نصیحت به کار آید.

به یک ناتراشیـــده در مجلســـی برنجـــــد دل هوشمندان بسی

اگـــر برکـــه‌ای پر کنند از گـــلاب سگی در وی افتد، کند منجلاب

Rakonto 17

Marŝanto kun nudaj kapo kaj piedoj kun la Hiĝaza karavano forlasis Kufe-on kaj kunvojaĝis kun mi sen havaĵo. Li marŝis trankvile kaj diris:

"Mi nek rajdas nek ŝarĝon havas.
Mi nek sklavon havas nek sklavas.
Por mi nek gajno nek perd' gravas.
Mi trankvile vivas kaj pravas."

Kamel-rajdanto diris: "Ho la derviŝo! Kien vi iras? Ne iru, alie vi mortos malfacile!" Sed li neglektis tiun averton kaj daŭrigis. Kiam ni atingis al Mahmud palmĝardeno(3) la riĉa rajdanto severe malsaniĝis kaj estis mortanta. La derviŝo venis ĉe li kaj diris: "Malfeliĉan min ne trafis morto, sed riĉan vin trafis tia sorto!

Pro malsanulo tutnokte larmis ies okul',
Matene li mortis sed pluvivis la malsanul'.
Foje rapid-ĉeval' ne povas fini,
Sed la celon atingas kripl-azeno.
Multaj sanuloj jam iĝis subteraj,
Kiam vunditoj vivas en sereno.

پیاده‌ای سر و پا برهنه با کاروان حجاز از کوفه بدر آمده و همراه ما شد و معلومی نداشت. خرامان همی رفت و می‌گفت:

نه باستر بر سوارم، نه چو اشتر زیر بارم نه خداوند رعیت، نه غلام شهریـــــارم

غم موجود و پریشانـــــی معدوم ندارم نفسی می‌زنم آسوده و عمری می‌گذارم

اشترسواری گفتش: ای درویش کجا می‌روی؟ برگرد که بسختی بمیری. نشنید و قدم در بیابان نهاد و برفت. چون به نخله محمود در رسیدیـم، توانگر را اجل فرا رسید. درویش به بالینش فراز آمد و گفت: ما بسختی بنمردیم و تو بر بختی بمردی.

شخصی همه شب بر سر بیمار گریست چون روز آمد بمرد و بیمار بزیست

ای بســـا اسب تیـــزرو کـه بمانـــد که خر لنگ جان به منزل بــــرد

بس که در خاک تندرستـــــــان را دفن کردیم و زخم خـــورده نمرد

Noto:
1- Derviŝa vestaĵo.
2- Laŭ Islamo, hundo estas malpura.
3- La lasta haltejo de karavanoj al Mekko.

Foto: ArtBirds_Persian-Star.org

Lingvostila Kontrolilo

LT Home Screenshots Support Development WikiCheck

Esperanto

asturia
belarusa
Bretona kata-
luna dana
germane angla
Esperanto
hispana
franca
galega
islanda
itala
kmera
litova
malajala
nederlanda
pola
portugala
rumana
rusa
slovaka
slovena
sveda
tagaloga
ukraina
ĉina

Esperanto

Kontroli

Bonvolu vidi **liston de problemoj**, se vi havas problemojn. Elŝuti **malnovajn versiojn** aŭ **ĉiutagan version**. Startigi per **Java WebStart**.
Lingvoilo (LanguageTool) estas libera plurlingva programo por kontroli stilon kaj gramatikon en Esperanto, sed ankaŭ en **multaj aliaj lingvoj**.
Lingvoilo atentigas pri tiuj eraroj, kiujn literuma kontrolilo ne trovas.
Lingvoilo povas ankaŭ atentigi pri literumaj eraroj, sed la versio por Libreoffice/OpenOffice nur atentigas pri gramatikaj eraroj.
Uzu Esperantan vortaron kune kun Lingvoilo por literumaj eraroj en Libreoffice/OpenOffice.
Por iuj eraroj, Lingvoilo sugestas korektojn, kaj fojfoje havas ligilon al retaj gramatikoj (PMEG de B. Wennergren, La tuta Esperanto de H. Seppik, aŭ Lernu!) aŭ al la Reta Vortaro por pliaj detalaj klarigoj pri la eraro.

- Tiu versio estas kromaĵo por LibreOffice/OpenOffice. Ĝi atentigas pri gramatikaj eraroj, sed ne pri literumaj eraroj, ĉar LibreOffice/OpenOffice jam faras tion post elŝuto de Esperanta vortaro por LibreOffice/OpenOffice.
- **Ni forte konsilas uzi** LibreOffice-3.5.4 (aŭ pli nova) aŭ Apache OpenOffice-3.4.1 (aŭ pli nova), ĉar pli malnovaj versioj havas cimon, kiu kaŭzas longan paŭzon je la startigo de la programo.
- Uzi Iloj… → Aldonaĵa mastrumilo… → Aldoni… en LibreOffice/OpenOffice.org

por instali tiun dosieron.

Elŝutado

Elŝuti la kromaĵon Lingvoilo por **LibreOffice/OpenOffice**	Elŝuti Lingvoilon memstara	Elŝuti LanguageToolFx por **Firefox**
Version 2.7 — 50 MB — Bezonas Java 7+	Version 2.7 — 81 MB — Bezonas Java 7+	-

Lingvoilo (LanguageTool) estas libera plurlingva programo por kontroli stilon kaj gramatikon en Esperanto, sed ankaŭ en multaj aliaj lingvoj.

Elŝuti LanguageToolFx por **Firefox**

Elŝuti Lingvoilon memstara

Version 2.7 — 81 MB — Bezonas Java 7+


Elŝuti la kromaĵon Lingvoilo por **LibreOffice/OpenOffice**

Version 2.7 — 50 MB — Bezonas Java 7+

- **Restartigi OpenOffice.org/LibreOffice** post la instalado de la kromaĵo.
- Se vi uzas LibreOffice-3.5.x kaj deziras kontroli tekstojn en la angla, elektu: Iloj… → Agordaĵoj… → Lingvaj agordoj→ Skribhelpoj por malŝalti LightProof kaj ŝalti Lingvoilon por la angla.
- Tiu versio estas por tiuj, kiuj deziras uzi Lingvoilon sen LibreOffice/OpenOffice, uzante ekzemple la grafikan Javainterfacon, aŭ en komanda linio, aŭ kiel servilo, aŭ ene de aliaj programoj kiel ene de la tekstoredaktilo Vim. Tiu versio ne nur atentigas pri gramatikaj eraroj sed ankaŭ pri literumaj eraroj dank' al vortaroj en Lingvoilo.
- Duoble-klaku sur la dosieron kaj startigu languagetool.jar. Vidu ankaŭ la aliajn manierojn por uzi Lingvoilon.
- Tiu kromaĵo por la retumilo Fajrovulpo (Firefox) kontrolas la gramatikon de apartigita teksto en TTT-paĝoj aŭ en tekstokampoj. Java ne estas bezonata.

Lingvoilo daŭre pliboniĝas. Reguloj estas ofte aldonitaj aŭ ŝanĝitaj. Por tiuj, kiuj deziras uzi la plej freŝan version,v ersioj
ĝisdatigitaj ĉiu-tage el la lasta versio en la git-deponejo ankaŭ haveblas (liston de ŝanĝoj). Sed atentu: tiuj versioj estas malpli
testitaj ol la oficiala versio. Tamen, Lingvoilo enhavas multajn aŭtomatajn testojn, do la ĉiu-tagaj versioj estas ankaŭ sufiĉe
sencimaj. Pli malnovaj oficialaj versioj ankoraŭ haveblas en la dosierujo de elŝuto.

Ekrankopio en LibreOffice



Lingvoilo povas atentigi pri pli da eraroj ol tiuj en la ĉi-supra ekrankopio. Gramatikaj eraroj trovitaj per Lingvoilo estas blue
emfazitaj. Literumaj eraroj trovitaj per la Esperanta vortaro de LibreOffice/OpenOffice estas ruĝe emfazitaj.
Certigu, ke la elektita lingvo de la teksto en LibreOffice/OpenOffice estas Esperanto, por ke la korektilo povu atentigi pri
Esperantaj eraroj.

Ĉu vi bezonas helpon?

Bonvolu vidi liston de la plej oftaj problemoj. Por plia helpo, vi povas demandi aŭ en la forumo, aŭ en la retpoŝta dissendlisto aŭ
retpoŝti al la verkisto de la Esperanta versio.

Ligiloj al aliaj Esperantaj kontroliloj

Lingvoilo ne estas la nura Esperanta gramatika kontrolilo. Vidu ankaŭ:
Lingvohelpilo
Esperantilo

Permesilo kaj kodofonto

Lingvoilo libere haveblas sub la permesilo LGPL. Kodofonto elŝuteblas ĉe github per git:
$ git clone https://github.com/languagetool-org/languagetool.git
La enhavo de la hejmpaĝo haveblas sub la permesilo CC BY-SA 3.0.

Esfandgan festo

En zoroastra kalendaro la 5a tago de ĉiu monato nomiĝas Sepanta Armaiti (=Esfand), kiu estas la kvara Ameŝasepando en zoroastria religio. (La vorto Ameŝasepando konsistas el du partoj, Ameŝa kiu signifas senmorta kaj Sepanta kiu signifas sankta kaj pura, ambaŭ tiu signifas senmorta sankto aŭ pura senmorto. Ameŝaspandoj estas puraj kvalitoj de dio.)
Sepanta Armaiti konsistas el Sepanta (sankta kaj pura) kaj Armaiti signife humileco kaj pacienco. Do la nomo de Ameŝasepando Sepanta Armaiti signifas sankta harmonio, humileco kaj pacienco. Ĉi tiu vorto en persa lingvo estas ŝanĝita al Sepandarmazo, Esfandarmazo kaj fine Esfando.

En ĉi tiu tago, la tago esfando de monato Esfando, oni celebris kune specialaj tradicioj kaj formalaĵoj. Zoroastranoj ĉiujare celebras la feston.
En antikva Irano, oni celebras ĉi tiun feston por respekti kaj omaĝi la staton de virino. Sepandarmazo estis Izado(anĝelo) kaj protektinto de tero kaj protektinto por piaj, justaj kaj bonfarantaj virinoj, kaj pro respektokaj omaĝo la viroj donacis al virinoj. En epoko de Aburejhan Biruni, ĉi tiu tradicio estis ankoraŭ laŭmoda.

El: Gahŝomari va ĝaŝanhaje Irane bastan
Verkis: Hashem Razi
Tradukis: Nader Zandi

De: ....



Kaj …

Antaŭaj numeroj disponeblas

Nomo:
Familia Nomo:
De numero: Ĝis numero:
Adreso:

Poŝt-kodo: Telefono:

E-poŝto:

Sendu la peton al la adreso:
E-poŝto: info@espero.ir

Bonan legadon,

Ĝis:



Troveblas Ĉe: www.espero.ir